der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

16. Jahrgang Nr. 103 (5/1980) ISSN 0014-0619 30 Pf

„Esperanto kreas ponton“

Intervjuo kun kamarado Ferdinand Eisen, ministro pri klerigado de la Estona Soveta Socialisma Respubliko

En „Hungara Vivo“ 1978/1 aperis intervjuo kun Károly Polinszky, hungara ministro de edukado, pri Esperanto kaj la monda lingva problemo. Tiam oni metis la demandon, kiu alilanda kolego de k-do Polinszky ekparolos pri la sama temo? Nun alvenis la tempo por tio: k-do Ferdinand Eisen, ministro pri klerigado de la Estona Soveta Socialisma Respubliko afable konsentis doni intervjuon al „Hungara Vivo“. La intervjuo estis farita en Lucerno, kie k-do Eisen sekvis la laborojn de la 64-a Universala Kongreso de Esperanto. „Hungara Vivo“ ĝin publikigis en n-ro 6/79.

Estas nemultaj ministroj en la mondo, kiuj scias Esperanton. Ĉu Vi povus rakonti, kiam kaj kiel Vi konatiĝis kun la Internacia Lingvo?

Estante lernanto, mi partoprenis agadon de maldekstrula gelernanta rondo, kie mi interkonatiĝis ankaŭ kun esperantistoj kaj eklernis la lingvon. Mia instiganto kaj la unua instruanto estis la konata estona revolucia agantо Nume Ruus*. Ĝis la komenco de la Dua Mondmilito mi uzis Esperanton por korespondado kun alilandaj esperantistoj.

Ĉu Vi persone iam spertis, ke lingvaj malfacilaĵoj malhelpis Vin en Via laboro kaj Viaj privataj kontaktoj?

Mi vojaĝis en multaj landoj kaj ofte sentis malagrablaĵojn pro la lingvaj baroj. En tiaj okazoj mi sentas psikan premon pro tio, ke mankas ebleco por rektaj kontaktoj kaj rilatoj inter la homoj. Mi opinias, ke Esperanto kreas ponton inter homoj de diversaj landoj kaj nacioj.

Kiel statas la instruado de fremdaj lingvoj en la Estona SSR kaj kiuspecaj problemoj estas solvotaj ĉikampe? Kiajn tradiciojn kaj aktualan staton havas la instruado de Esperanto? Ĉu Vi povus diri ion pri la perspektivoj?

En la lernejoj de la Estona SSR oni instruas la rusan kaj ankoraŭ unu fremdan lingvon — la anglan, germanan aŭ francan. La rusan lingvon

---

* Nume Ruus (1911—1942) agadis ankaŭ kiel Cseh-instruisto en Skandinaviaj landoj. Estis murdita far germanaj fašistoj.

nun oni instruas ekde la dua klaso, la duan fremdan lingvon ekde la kvina klaso. Krom tio oni instruas en kelkaj lernejoj fakultative ankaŭ Esperanton. Por la rusa kaj aliaj fremdaj lingvoj estas kreita plena komplekso de instru-metodika literaturo kaj aliaj lerniloj, ekzistas multaj instruistoj. Por Esperanto preskaŭ mankas instruistoj. Aperis lernolibro por kursoj kaj memlernantoj, kiun oni uzis ankaŭ en lernejaj klasoj kaj studrondoj. Pro elĉerpiĝo de tiu lernolibro nun estas preparata ĝia nova eldono, pli adaptita por uzado ankaŭ en lernejoj. Por Esperanto-instruistoj ni organizis kaj organizos somerajn kursojn, kiuj tamen estas ne plene kontentiga solvo de la instruista problemo.
Jam ĝis nun niaj instruistoj kaj gelernantoj estis oftaj partoprenantoj de someraj esperantistaj tendaroj. Tiuj tendaroj havis la ĉefan taskon ebligi praktikan uzadon de Esperanto al gelernantoj kaj gejunuloj el diversaj sovetaj respublikoj.
Ni esperas, ke estonte ni sukcesos krei kunlaboron ĉikoncerne inter gelernantoj kaj junaj esperantistoj de nia respubliko kaj tiuj de aliaj socialismaj landoj.

Ĉu Vi trovas, ke la instruado de Esperanto povas signife kontribui al la edukado pri internaciismo?

Sendube la instruado kaj disvastigado de Esperanto kunhelpas al pli bona interkompreniĝo de la popoloj, al plivastiĝo de interkomunikado de diverslandaj gejunuloj, al ilia edukado en la spirito de internaciismo, en la spirito de kompreno kaj estimo de alinaciaj kulturoj. Mi konsideras tre grava la plifortigon de kontaktoj inter la laboristaj gejunuloj de diversaj landoj.

Kiom influos la fondiĝo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj la divastiĝon de Esperanto en la Estona Soveta Socialisma Respubliko?

La kreiĝo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj estas ankoraŭ freŝa fakto. Estas frue paroli pri ties rezultoj. Mi opinias, ke ekzisto de tut-Sovetia centro ne nur ebligas pli viglan kaj rezultoplenan agadon, sed ankaŭ instigas kaj devigas al pli bona laboro.

La hungara kaj estona popolo delonge konsideras parencoj unu la alian. Dank' al tio kulturaj interŝanĝoj inter ni estas viglaj. Ĉu Vi vidas eblon de kunlaborado inter Hungario kaj la Estona SSR sur la kampo de la instuado ĝenerale, kaj speciale koncerne la instruadon de Esperanto?

Mi antaŭvidas vastajn perspektivojn por kunlaboro inter hungaraj kaj estonaj esperantistoj. Inter niaj lernejanoj jam longan tempon ekzistas kontaktoj, interŝanĝo de laborbrigadoj kaj junpioniraj grupoj. Se ni aldonos al tio ankaŭ Esperanton kiel rimedon de interkomunikado kaj reciproka komprenado, do niaj kontaktoj plioftiĝos. Eble troviĝos kunlabora maniero ankaŭ por komuna edukado de Esperanto-instruistoj kaj eldono de instruliteraturo.

Sur ambaŭ kampoj ja Hungario jam havas elstarajn spertojn kaj rezultojn. Mi deziras bonan sukceson al niaj hungaraj amikoj kaj al nia laŭebla kunlaboro!

Kamarado Ministro, dankon pro la intervjuo.

Vilmos Benczik

Letero al virinoj

Kara Amikino,

ĉu vi pripensis iam pri la kialo de nia vivo? Al kio celas nia dumviva laboro? Ĉu vi konsentos, ke ni volas prepari ĉion plej bonan por niaj posteuloj? Ne nur por niaj familianoj, sed por la granda tutmonda familio, por ĝenerala kontenteco, amikeco, amo kaj por la tutmonda paco. Jes, por paco, ĉar ni ĉiuj scias ja, ke por vivo, amo, por kontenteco por nia laboro necesas unuavice fari ĉion por defendi — konservi la pacon, haltigi produktadon de armiloj, haltigi superregadon de unu nacio super la alia. Ni ĉiuj deziras tamen pacan kunvivadon, reciprokan kompreniĝon inter la popoloj — do, aldonu ankaŭ ni — virinoj — nian ŝtonon al la konstruado de la mondo sen militoj, sen mizero — ne sufiĉas nur revi pri la paco!

Nia internacia lingvo ESPERANTO povas helpi al la interkompreniĝo de diverslingve parolantaj popoloj. Ni, esperantistinoj, havas jam spertojn kiel diri unu al la alia la veron, ni estas kapablaj paroli pri ĉio — pri ĉio bela, interesa, pri ĉio, kio nin kunligas, kio nin povus unuigi, sed ankaŭ pri ĉio, kio estas malagrabla, kio nin turmentas kaj maltrankviligas.

Se ni, almenaŭ helpe de korespondado, amikiĝos, certe neniam poste ni volos batali unu kontraŭ la alia. Geamikoj tamen ne bezonas armilojn, ĉar ili daŭre volas vivi en amikeco, kontenteco kaj volas sin reciproke helpadi. Plivastigu ni, virinoj el diversaj landoj, reciprokan amikecon, promesu al ni pli viglan agadon, informadu nin per korespondado, kion ni povus fari en nia lando por defendi pacon. Ni skribu unu al la aliaj ankaŭ pri niaj ĉiutagaj sukcesoj en laboro, en nia familia rondo, serĉu ĉe la aliaj konsilojn kaj konsolojn, disdonu male la konsilojn, spertojn, ridetojn al ĭa bezonantaj, sciigu ankaŭ al ceteraj la malsukcesojn — ili povus servi kiel ekzemploj. Ni ĉiuj aŭ mem aŭ per diversŝtupa helpo edukadis, edukadas kaj edukados infanojn, junularon, ni kuiras, ni fotografas, mastrumadas, zorgas pri ĝardeno, vestado, interesiĝas pri muziko, sporto, teatraĵoj; ni havas multe da hobioj, ankaŭ eĉ devoj — do oni vidas, ke ĉio povas esti nia komuna punkto de amikeco.

Kaj ĉiu amika kontakto povas esti komenco de la batalo kontraŭ milito!

La VIII-a Konferenco de MEM en Varna elektis novan Internacian Komitaton kaj novajn gvidantojn de la komisionoj, inter ili ankaŭ de la **virina.** Ĝiaj celoj estas:

- instigi la esperantistinojn komune batali por la paco;
- instigi la landajn sekciojn de MEM elekti virinon, aŭ se eble virinan komitaton, kiu kunlaborus kun la virina komisiono de MEM;
- okazigi kontaktojn kaj kunlaboradon kun virinoj internacie kaj kun porpacaj organizaĵoj kaj ties landaj sekcioj;
- organizi internaciajn kontaktojn kaj renkontojn inter la virinoj.

Gvidantino de la virina komisiono de MEM estas Maria TURKOVÁ, Vrchlického 7, 320 29 PLZEN, Ĉehoslovakio.

Fariĝu ankaŭ vi, nia kara amikino, pacdefendantino, aliĝu al la komisiono de virinoj ĉe MEM. Serĉu en via lando, en via urbo aŭ ĉirkaŭaĵo la ceterajn virinojn por la porpaca laboro — skribu rekte al mi, se vi mem volus, aŭ se iu alia virino el via lando volus kunlabori. Skribu al mi pri tiu ĉi afero, mi atendas vian respondon, skribu ankaŭ al ceteraj viaj amikinoj pri tio.

Via Maria Turková

Personecforma efiko de Esperanto

Tezoj pri la personecforma efiko de la okupiĝo pri Esperanto, de studkonsilanto d-ro ped. Hans-Joachim Hußner, Teknika Altlernejo Ilmenau.
En 1979 pretiĝis scienca studo pri la supre menciita temo por kontribui al scienca bazigo de la Esperanto-movado. La studo fariĝis iom longa, ke ne eblas ĝin publikigi ĉi tie komplete. Tial mi prezentas ĉi-loke kelkajn rezultojn en formo de tezoj, ĉar la kolegoj, kiuj alsendis la enketilojn, eksciu, kiun valoron alportis ilia ellaboro por la esploro.

La temo estis prilaborita per logikaj metodoj kaj apogita per adekvataj esploroj. Teoria kaj esplora partoj de la laboro kondukis al la jenaj rezultoj:

1. La formado kaj edukado de iu persono sin direktas al la internaj kondiĉoj de la personeco kaj efikas kiel postulo de la ekstera mondo al tiu personeco. La personeco devas enpsikigi (psikointernigi) tion kaj ĝin prilaboras per helpo de ĝiaj internaj kondiĉoj. Rezultiĝas ago aŭ determinita agadmodelo. Tio signifas ke la personeco sin elpsikigas (psikoeksterigas). La postuloj do venas el nia socialisma praktiko, kaj la personeco efikas per siaj internaj kondiĉoj denove al la socialisma praktiko. Laŭ dependo kiu ekzistas inter socialisma praktiko kaj evoluo de la socialismaj personecoj kaj iliaj kolektivoj progresas la kvalita kaj struktura evoluoj de la internaj kondiĉoj de la personeco reefikante al la socia praktiko. La okupiĝo pri Esperanto tiel servas rekte al la evoluo de la socialisma socio kaj ebligas pli rapidan kaj pli facilan integriĝon de la socialismaj popoloj kaj tiel rekte kaj malrekte al la mondpaco.

2. Ĉiu socia personeco estas determinita, t. e., ke la tuteco de la internaj kondiĉoj en kvalito kaj strukturo estas la rezulto de la sociaj rilatoj, al kiuj ja finfine estas rekondukataj ĉiuj pedagogiaj klopodoj. Sekve devas estiĝi diferenco jam el tio, ĉu ano de antagonisma klassocio sin dediĉas al Esperanto-instruado, aŭ ĉu tion faras socialisma personeco. La menciita postulo trafos malsamajn internajn kondiĉojn. La rezultoj tiam estos malsamaj.

3. Sub la internaj kondiĉoj de la personeco ni komprenas a) la ekkonanmovan (kognitivan-motoran) grupon kun scio kaj povo, spertoj, kapabloj kaj lertecoj kaj b) la emocian grupon kun komprenoj, kutimoj, certecoj, konvinkoj, sintenoj, interesoj, simpatioj, sentoj, karaktero k. t. p. Ĉiuj internaj kondiĉoj troviĝas en interdependa rilato.

4. Esperanto estas neŭtrala lingvo kaj tial ne povas krei malakceptan tendencon en la sfero de la internaj kondiĉoj de la personeco.

5. Per la postuloj de la socialisma socio al la socialisma personeco jam estas donataj pli favoraj kondiĉoj ol sub kapitalismaj cirkonstancoj. Socialismaj homoj lernas Esperanton sur la bazo de la socialismaj produktadaj rilatoj kiel nepra antaŭkondiĉo por la popola interkompreniĝo, ĉar ili volas kontribui al ĝi sukcese. La lingvo Esperanto fariĝas en tiu interrilato progresiva subjektiva faktoro.

Same facile Esperanto ebligas lingvan kontakton kun homoj el aliaj landoj kaj lige kun tio ankaŭ senĝenan spiritan kontakton kun fremdaj kulturoj. Tio devas efiki subtene al la evoluo de la socialisma personeco.

6. La plej grava interna kondiĉo estas la konvinkoj. Atinginte dominantan gravecon, ili fiksas la decidojn de la personeco. La jam menciitaj interligoj klarigas, ke socialismaj konvinkoj, sed ankaŭ kutimoj, spertoj, interesoj, kapabloj, lertecoj k. t. p. estos elformataj, do la socialisma personeco ricevas fortajn stimulajn impulsojn por sia evoluo. Esperanto do ne estas nur rimedo por interkompreniĝo, sed ankaŭ posedas personecformantan efikon je tre alta nivelo. Esperanto faciligas la komprenon de sciencaj kaj fakaj vortoj kaj de la propra lingvo. Esperanto subtenas la ellernadon kaj uzon de ĉiu alia lingvo sub la kondiĉo, ke tio sufiĉe frue komenciĝas. Tial ĝi ankaŭ estas uzebla kiel „interlingvo“ ĉe la eklernado de naciaj lingvoj.

7. Tiuj pripensoj ricevis fortan subtenon per enketado. Interesaj estis la motivoj, pro kiuj la homoj lernas Esperanton. Estas distingeblaj du grupoj da motivoj. Unu grupo havis motivojn de ĉefe subjektiva karaktero, la dua grupo motivojn de ĉefe socia karaktero. La rezultoj de la enketado de esperantistoj estis statistike prilaboritaj.

Sekvas la punktoj por la agadmaniero:

– Tiuj punktoj povas ricevi la valoron —1 (ekstreme negativa) ĝis +1 (ekstreme pozitiva).
Respondo al la unua motivgrupo: 0,5
Respondo al la dua motivgrupo: 0,4

– La konsultitaj personoj okupiĝas pri Esperanto pro diversaj motivoj. Nuntempe personaj motivoj ankoraŭ elstaras, sed stimulan rolon jam ludas ankaŭ gravaj sociaj motivoj. Estas pravigebla la konstato, ke la motivstrukturo de la personoj, kiuj lernas kaj uzas Esperanton en GDR, estas bone evoluintaj. Ili tamen devas esti plu evoluigataj per taŭgaj paŝoj por utiligi la personecformantan efikon de Esperanto por nia persona kaj socia evoluoj.

– La socia konsisto de niaj Esperanto-grupoj estu pripensata. Oni grandskale gajnu produktadlaboristojn. La meznombra aĝo de 46 jaroj estas plibonigebla precipe per instigado de infanaj kaj junularaj grupoj.

– La esperantistoj en GDR realigas ampleksan leterinterŝanĝon kaj vizitas siajn geamikojn en konforma mezuro aŭ akceptas tiujn en GDR. Plej fortaj estas la kontaktoj kun socialismaj landoj.

– 31 % el la konsultitaj viroj konstatas, ke ilia kompreno de fremdaj lingvoj pro Esperanto kreskis kaj 56,3 % aplikas siajn sciojn de Esperanto al la gepatra lingvo. Ĉe la virinoj tio estas iomete alia. Ĉi tie ni trovas respektive 17,6 % kaj 38,2 %.

– 42,2 % el la viroj rimarkas pliboniĝon de la memoro, 18,8 % neas tian pliboniĝon. Nur 17,6 % el la virinoj konstatas pliboniĝon de la memoro, 29,4 % neas tion.

– 53,1 % el la viroj pensas, ke ilia rilato al aliaj popoloj pliboniĝis, 3,1 % neas tion. 42,2 % el la virinoj parolas pri tiurilata pliboniĝo, 14,7 % havas kontraŭan opinion. Tiuj nombroj bedaŭrinde ne estas utiligeblaj. Neoj ofte motiviĝas per la konstato, ke oni neniam havis nebonan rilaton al aliaj popoloj.
Multaj geamikoj ne respondas la demandon pro la sama motivigo. Por plibonigo de la rilato al aliaj popoloj oni menciis la jenajn kaŭzojn:

  = malpliigo de malnovaj antaŭjuĝoj

  = estiĝo de amikaj rilatoj

  = pli bona kompreno de fremda konduto.

– La respondoj pri la demando, ĉu ĉiuj problemoj estas solveblaj per Esperanto, substrekas la neceson de pli bona politika-ideologia edukado en la Esperanto-grupoj: 25 % el la viroj kaj 23,5 % el la virinoj opinias, ke Esperanto povas solvi ĉiujn problemojn inter la nacioj. 12,5 % el la viroj kaj 5,8 % el la virinoj respondas tiun demandon neŭtrale. Estas evidente, ke el tiu rezulto dedukteblas konsekvencoj por la Esperanto-movado en GDR. Resume oni povas diri, ke Esperanto povas pli forte plibonigi la efikon de instruistoj kaj edukistoj al la internaj kondiĉoj de la personeco ol lernado kaj uzado de alia lingvo. Do nia personeco kaj nia socialisma socio profitas el tiu interesa aktiveco kaj tial ni lernu kaj uzu Esperanton.

Postrimarko de la redakcio:

La prezentita temo sendube estas tre grava. El la tezoj tamen ankaŭ videbliĝas, ke supozeble oni povas veni al diversaj konkludoj, konsentoj kaj nekonsentoj kun la aŭtoro. Interisitaj aŭ pri la temo kontribuemaj legantoj bv. kontakti rekte la aŭtoron d-ron Joachim Hußner, 6300 Ilmenau, Böttgerstraße 7b.
Verŝajne oni povus inter alie sin demandi,

(a) ĉu vere Esperanto servas (ĉiam? aŭtomate?) „rekte al la evoluo de la socialisma socio“ (tezo 1),

(b) ĉu tiel klare estas diferenco „ĉu ano de antagonisma klassocio sin dediĉos al Esperanto-instruado aŭ ĉu tion faros socialisma personeco“ (tezo 2)

(c) ĉu vere (ĉiam?) Esperanto „ne povas krei malakceptan tendencon en la sfero de la internaj kondiĉoj de la personeco“.

Krome: Kiel oni prijuĝu, ĉu vere Esperanto plifortigis la memorkapablon k. t. p.
Do la publikigo de la tezoj ne signifas sintenesprimon de la redakcio.

Forpasis poeto: Aleksandr Logvin

Meze de julio 1980 mortis la konata soveta esperantisto-poeto Aleksandr Logvin. La GDR-eldonoj de „Paco“ kaj foje ankaŭ „der esperantist“ publikigis multajn liajn poemojn. En la jaro 1964 aperis lia poemkolekto „Sur la vivavojo“ en la Stafeto-eldonejo de J. Régulo (La Laguna). Ni funebras pro la forpaso de elstara esperantisto poeto. Omaĝe al la forpasinto ni publikigas poemon, antaŭ lia morto senditan al „der esperantist“.

Al Galileo

Aleksandr Logvin †

Vin volas juĝi nunaj kardinaloj.
Reeĥas la inkvizitora ĥor'.
Susuras vatikanaj praanaloj ...
Ribele batas mia olda kor'!

Sen Papa ben', sen kardinal-sankcio,
Spite al voĉo de la juĝantar'—
Vin reabilitigis historio![1])
Kaj vin rehonorigis la homar'!

Jubilu, Justo! Reviviĝu, kreo!
Scienco, ĝuu ĝojon de liber'!
Ho, turmentito, granda Galileo,
La suno vin salutas sur la ter'!

Kaj ĝojas ni, venintaj al terglobo
Post morna la triono de l'jarmil'.
Kaj astra lum' de via horoskopo
Radias universe kun jubil'!

Galileo eminenta itala fizikisto kaj astronomo (1564—1642), prof. en Pizo kaj Padujo, en 1633 laŭ postulo de eklezio devis apostati de Kopernika doktrino kaj estis ekzilita.

Galileo eltrovis leĝojn de libera falado de korpo, balanciĝon de pendolo; li inventis lornon (la unuan teleskopon), eltrovis sateliton de Jupitero, ringon de Saturno kaj kraterojn sur la Luno.

Raportoj pri grava seminario

Kiel ni amplekse informis (kp. 3/1979, p. 18) en la jaro 1979, de la 16a ĝis 19a de aprilo 1979, CLE organizis interlingvistikan seminarion por germanaj lingvistoj (do ne por esperantistoj), kiu havis tre grandan stimuligan efikon en la rondoj de lingvosciencistoj de GDR. La efiko de tia seminario daŭras. Intertempe ankaŭ aperis ampleksaj raportoj en „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung“, Berlin, n-ro 4/1980 (D. Blanke) kaj en „Wissenschaftliche Zeitschrift der Universität Halle, Gesellschaftswiss. Reihe, Band XXIX, 1980, n-ro 2, p. 127—128 (O. Troebes).

---

[1]) reabiliti — repravigi, rerajtigi.

Detlev Blanke

Informado kaj argumentado II

(daŭrigo el „der esperantist“ 4/1980)

2. La scio pri la temo

Antaŭ ol povi efike kaj rezultodone informi kaj argumenti pri la internacia lingvoproblemo ĝenerale kaj aparte pri Esperanto oni konsideru la kaŭzojn por la skeptikeco ĉe la partnero, distingu klare kelkajn terminojn kaj entute klopodu konstrui al si solidan sciobazon.

2.1. 11 kaŭzoj por skeptikeco

Estas fakto, ke la problemo de internacia lingvo, kaj precipe la konkreta solvopropono reprezentata per Esperanto, renkontas sufiĉe fortan skeptikecon en la ĝenerala publiko. Se oni ja eventuale pretas agnoski la dezirindecon de unu komuna internacia lingvo, tiam tio ofte ne inkludas pozitivan scion aŭ rilaton al Esperanto. Informante kaj argumentante pri Esperanto oni devas tion konsideri kaj, se eble, ion scii pri kaŭzoj kondukantaj al tiu skeptikeco. Ni menciu almenaŭ kelkajn ĉefajn:

1) Pro postefikoj de tradiciaj konceptoj en la lingvoscienco, iagrade ankaŭ populariĝintaj, multaj homoj ne povas imagi al si, ke planlingvo vere povas funkcii kiel ĉiu ajn etnolingvo. Regas ankoraŭ superstiĉaj konceptoj pri la ligiteco de la lingvo al iu „nacia animo“ aŭ pri la lingvo kiel organismo netuŝebla, kiu „naskiĝis“ (iam en prapraj tempoj), vivadas plensange“ kaj ne estas anstataŭigebla per „artefarita senanimaĵo“.

2) Multaj tute elementaj faktoj pri la aplikateco kaj funkciado de Esperanto simple ne estas konataj, i. a. ankaŭ pro jardekojn longaj eraroj en la informpolitiko de la Esperanto-movado. (i a. sur unu flanko parte altrudema neserioza propagando kaj aliflanke iusenca izoliĝemo en la „verda familio“ mem).

3) Ekzistas ankaŭ simple miskomprenoj pri la esenco de la problemo de internacia lingvo.

Ne malofte, ankaŭ pro la ekzisto de kosmopolitismaj sektoj en la Esperanto-movado (ekz. Sennaciistoj, aŭ projektoj pri mondsavaj kaj mondaj „registaroj“ kaj institucioj propagandataj en la Esperanto-movado) oni erare identigas la ĉefajn celojn de la Esperanto-movado (la utiligo de Esperanto kiel lingvo de la internacia interŝtata komunikado) kun tiuj de ĝiaj malgravaj sektecaj partoj. La rezulto povas esti la senpera rilatigo aŭ identigo de difinita ideologio aŭ koncepto kun Esperanto (ekzemple Esperanto + kontraŭnacia kosmopolitismo).

4) Pro malklara koncepto pri la tuta problemo de internacia komunikado kaj pro terminologia konfuzo (universala lingvo, mondlingvo, internacia lingvo, helplingvo, k. t. p.) multaj homoj simple miksas la du malsamajn problemojn de

a) tutmonda unusola lingvo, „mondlingvo“ de la fora estonteco
kaj

b) internacia apudgepatra interŝtata lingvo.

Pro a) oni vidas en Esperanto atakon kontraŭ la konservindaj kaj valoraj etnolingvoj (pri terminoj vidu 2.2.).

Ĉi-rilate iuj interpretintoj de la teorio de J. V. Stalin[12]) pri la iam dum fora estonteco kunfandiĝonta — el naciaj lingvoj — unusola tutmonda lingvo diligente miksis a) kaj b) konkludante, ke Esperanto estas ne harmoniigebla kun tiu (por la nuntempo ne tro interesa) teorio.
Iuj postrestaĵoj de tiuj ideoj, almenaŭ ĉe kelkaj maljunaj marksistaj funkciuloj, kelkfoje ankoraŭ estas konstateblaj.

5) Inter iuj lingvistoj, iom orientiĝantaj en la historio de la planlingvaj provoj, estas konstatebla kelkfoje iu certa malŝato por la verkoj de amatoroj. Ja estas fakto, ke precipe nelingvistoj, do amatoroj, nome la prelato Schleyer (1879 Volapük), la okulkuracisto Zamenhof) (1887 Esperanto), la logikisto Couturat (1907 Ido), la matematikisto Edgar de Wahl (1924 Occidental-Interlingue) kreis pli malpli sukcesajn planlingvojn. La projekto de la mondfama lingvisto O. Jespersen (1928 Novial) kaj de la filologo A. Gode (1951 Interlingua) ne havis aŭ — en la kazo de Interlingua — apenaŭ havas sukceson.
Tiel rilatantoj, cetere, simple forte subtaksas la valoran kontribuon ĝuste de amatoroj por la homara progreso.

6) Fortan skeptikecon kaj antipation (malsimpation) oftege vekos la neadekvata, tro entuziasma kaj laika propagando flanke de la adeptoj de Esperanto mem. Malalta scio pri bazaj lingvistikaj leĝoj (ekzemple la nescio, ke polisemio estas necesa trajto de ĉiu ajn lingvo kaj ke estas erara la postulo de la formulo „unu vorto = unu signifo“), konscia aŭ nekonscia falsado de la realeco (pri „facileco“, „internacieco“, disvastigo de Esperanto k. t. p., kvankam ĝuste tiuj tri ecoj de Esperanto estas tre relativaj), malbona rego de lingvo mem k. s. nur plifortigis tiun skeptikecon. (Komparu ekzemple la libron de Richard Schulz „Mein geliebtes Esperanto“ = Mia amata Esperanto)[13])

7) Malĝusta kompreno pri **socia**j evoluprocesoj kaj pri la socia rolo de lingvo ĝenerale, kaj speciale de internacia lingvo kiel Esperanto, kondukos inter multaj adeptoj de Esperanto al supertakso de ĝia rolo por la socio. Multaj esperantistoj propagandas la lingvon tiel, ke ĝi kvazaŭ savus la homaron antaŭ la pereo.

Certan konkretiĝon por Esperanto de tiu supertakso de lingvo kiel konfliktforigilo kaj interharmoniigilo oni trovas en la t. n. „Interna Ideo“.[14])

Kompreneble tiuj ideoj devas renkonti fortan skeptikon ĉe sobraj intelektuloj.

8) Tre negativan efikon havas sekteca konduto de multaj propagandistoj de Esperanto, strangaj ornamoj per multaj steloj, eĉ malbona rego de la gepatra lingvo, altrudemo, netoleremo kontraŭ aliaj opinioj k. s. Bedaŭrinde ofte oni tro rapide konkludas, ke la idealo defendata de tiuj malseriozuloj mem ankaŭ ne povas esti serioza.

9) Se ekzistas supertakso de lingvo kiel socia forto, ankaŭ tute sendube ekzistas tre disvastiĝinta **subtakso** de la internacia lingva problemo kun ĝiaj negativaj sociaj sekvoj. Ankaŭ tio kondukas al neglekto kaj ignorado de Esperanto.

10) Nur relative malmultaj personoj, (pro profesiaj aŭ aliaj kaŭzoj) vere spertas la komplikecon de la internacia lingva komunikado, havas praktikan scion kaj teorian koncepton pri ĝi. Tro multaj sekvas la disvastiĝintan eraran opinion pri la sufiĉeco de la fremdlingvaj scioj, pri kiuj disponus la moderna homo kaj, sekve, trovas tute superfluaj la klopodojn de la esperantistoj.

11) Tre grava kaŭzo de necerteco kaj dubemo rilate al Esperanto estas la fakto, ke iu teorio aŭ science defendebla koncepto pri la internaciaj lingvopolitikaj problemoj preskaŭ mankas. En la marksisma-leninisma literaturo oni ekzemple nur malofte trovas materialojn (kaj se jes, tiam ĝenerale nur de konataj interlingvistoj), en kiuj oni aplikas la leninan koncepton pri la samrajteco de la nacioj kaj ties lingvoj al la **internacia** interŝtata **sfero.**

Konsciante pri tiuj kaj certe aliaj mencieblaj kaŭzoj pri skeptikeco oni pli bone komprenas la diskutpartneron kaj kapablas pli sobre kaj pli efike informi kaj argumenti.

Notoj

[12]) J. Stalin: Der Marxismus und die Frage der Sprachwissenschaft, Berlin 1951, p. 57 — 65

[13]) R. Schulz: Mein geliebtes Esperanto, Gerlingen-Stuttgart 1978, dua eldono, vidu la kritikon de D. Blanke en GDR-Paco 1979

[14]) Vidu D. Blanke: „Pri la interna ideo de Esperanto" en „Paco" 1979 (GDR-eldono) kaj en „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado", Budapest 1978

(daŭrigota)

D-ro Karl Schulze - 70-jara

La esperantistoj de GDR tre kore gratulas al sia tradukisto d-ro Karl Schulze el Berlin, membro de CLE, kiu festas la 26an de novembro 1980 sian 70an naskiĝtagon. D-ro Schulze konatiĝis kiel tradukinto de la mondfamaj romanoj „Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz kaj la „Trigroŝa Romano" de Bertolt Brecht. El lia plumo krome venis multaj recenzoj kaj tradukoj de rakontoj, noveloj kaj poemoj. Estas prespretaj pli ol 30 rakontoj de GDR-aŭtoroj kaj aliaj manuskriptoj. La traduka arto de la jubileulo trovis internacian aprezon. Al li ni deziras ankoraŭ multajn jarojn da sano kaj krea forto.

Esperantistoj-filologoj

La Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj (IUEF) jam havas malgrandan jubileon – 15 jarojn de sia fondiĝo. En la kadro de la 48 UK de Esperanto okazinta en Sofio en 1963 laŭ iniciato de la elstara esperantisto-veterano Atanas Atanasov – ADA, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto estis kunvokita fakkunsido de esperantistoj-filologoj. Partoprenis 12 kolegoj, inter kiuj la elstara sovetia (forpasinta) s-ano Prof. d-ro Eŭgeno Bokarjov. Tie fondiĝis la unuiĝo. Ĉar el diversaj landoj estis nur unuopaj esperantistoj-filologoj la kunsido komisiis al la bulgaraj kolegoj ekgvidi la novan organizaĵon. Prezidanto estiĝis s-ro ADA, kiu 11 jarojn gvidis la unuiĝon. En tiu tempo estis eldonitaj 20 cirkuleroj, kiuj entenis ne nur organizajn sciigojn kaj artikolojn, sed ankaŭ sciencajn.

En la komenco de 1974 okazis balotado kaj rezulte estis elektita nova Gvida Komitato konsistanta el: Violin Oljanov – prezidanto, Kunĉo Válev – vicprezidanto, Ljuben Marikin – sekretario-kasisto, Ljudmila Paspaleeva, Marin Bácev, Lilija Párŝorova – ĉiuj el Bulgario, Detlev Blanke el GDR kaj Simon Aarse el Nederlando. Antaŭ du jaroj forpasis s-anino Parŝorova. Ljubomir Marikin laŭ lia peto estis liberigita de la funkcioj de sekretario-kasisto. La sekretarian postenon okupis Marin Bácev kaj la kason provizore akceptis la prezidanto Oljanov.

La nova estraro iniciatis kvarmonatan bultenon „Filologo“, de kiu ĝis nun aperis 12 kajeroj. Ĉiu el ili entenas almenaŭ unu esperantologian aŭ interlingvistikan artikolon, nome: „Interlingvistika utopiismo“ de Prof. D-ro Stojan Ĝuĝev, membro de AdE; „Bona ŝanco“ de Rajna Konstantinova (pri la samtitola libro de d-ro W. Bormann); „Interlingvistiko“ de ADA „Pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko“ de Magomet Isaev; „Lingvo kaj nacio“ de Ljubomir Mihailov (recenzo pri la samtitola verko de Baziev kaj Isaev); „Fonemoj kaj Esperanta elparolo“ de Violin Oljanov; „Recenzo pri libro „Esperantonimoj“ de Marinko Ĝivoje„ de Marin Bácev; „Ankoraŭfoje pri interlingvistiko“ de Stefan Maserov; „Ergativa kazo“ de ADA; „Difina artikolo kaj ĝia uzado“ de A. Vaitilavičius; „Konfronta komparo de Esperanto kaj la germana lingvo“ de Detlev Blanke; „Pri la personaj nomoj“ de Friedrich Coburger; „Pri la influo de la slavaj lingvoj al Esperanto el leksikologia vidpunkto“ de Michel Duc Goninaz; „La vortklasifiko laŭ Plena gramatiko“ de Félix Garcia Blazquez.

Oni povus konkludi el tiu listo, ke estis publikigitaj variaj kaj interesaj por filologoj temoj. Kompreneble nia bulteno povus esti pli enhavoriĉa, se pli da kolegoj kontribuus.

En Sofio ekzistas aparta grupo de esperantistoj-filologoj, kiu unuigas ĉirkaŭ 50 – 60 membrojn. Ties prezidanto estas la vicprezidanto de IUEF Kunĉo Válev. Ĝi okazigis ĉiumonate kunvenojn en la Sofia universitato kun esperantologiaj, interlingvistikaj kaj aliaj prelegoj. Ili estis akceptataj

kun granda intereso ne nur de niaj membroj, sed ilin vizitis ankaŭ multaj aliaj sofiaj kaj eĉ ekstersofiaj esperantistoj. Iam okazis tre ardaj diskutadoj, kiuj ne povis finiĝi en unu kunsido kaj oni devis destini kroman eksterregulan kunsidon.

Nun la Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj havas entute 138 membrojn, el kiuj 79 efektivajn kaj 59 kunlaborajn. Laŭ landoj ili distribuiĝas jene:

Belgio 2, Brazilo 2, Britio 3, Bulgario 70, ĈSSR 3, Danlando 2, FRG 4, Finnlando 2, Francio 7, GDR 2, Hong-Kong 1, Hungario 2, Hispanio 1, Italio 3, Japanio 2, Jugoslavio 3, Kolombio 1, Nederlando 2, Norvegio 1, Pollando 2, Rumanio 3, Svedio 2, Sovetunio 8, Sudafrika respubliko 1, Usono 8, Venezuelo 1.

Laŭ nia opinio ni povus duobligi la membraron.

La Gvida Komitato akceptis la sugeston de kolego Detlev Blanke faritan antaŭ du jaroj pri internaciigo de la Gvida komitato kaj por tiu celo entreprenis konformigon de la statuto. Estis proponitaj pluraj ŝanĝoj, kiuj ĝin koncizigis kaj precizigis iujn artikolojn. La nova statuto estas akceptita preskaŭ unuanime (la rezultoj estas publikigitaj en n-ro 12 de „Filologo“) kaj ĝi estas disdonita al ĉiuj membroj.

Nun por plifortigo de IUEF kaj ties aktiveco ni opinias necesa:

1. Elekti novan aktivan Gvidan Komitaton kun reprezentantoj el pluraj landoj.
2. Entrepreni kampanjon por varbado de membroj.
3. Instigi al regula pago de la membro-kotizo.
4. Nomi perantojn en diversaj landoj.
5. Iniciati komunajn laborojn en la sfero de la esperantologio, interlingvistiko kaj diversaj fakoj de la ĝenerala filologio.
6. Instigi kaj helpi disertaciojn kaj aliajn verkojn pri esperantologiaj temoj.

Nia firma opinio estas, ke la Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj havas lokon en la monda E-movado kaj ĝi povus grave evoluigi la esperantologion, kontribui al la evoluo de la lingvo kaj propagandi ĝin en la medio de sia filologa kolegaro. Konsiderante tion ni alvokas nian membraron kaj ĉiujn filologojn-esperantistojn unuigi siajn fortojn kaj pli aktive kontribui al efektivigo de la celoj de la unuiĝo.

(El „Filologo“ 13, aprilo 1979)

Rimarko de la redakcio

Filologie interesitaj esperantistoj el GDR povas aliĝi al IUEF petante de la Gvida Komitato (IUEF, Sofio, p. k. 66, Bulgario) necesajn informojn. La kotizo estas 2 levoj kaj pageblaj ankaŭ, interkonsente kun IUEF, per filologiaj libroj. D. Blanke estas peranto por IUEF en GDR.

Grava libro por interlingvistoj

Interlingvisto sendube interesiĝas pri la nuntempa lingva situacio de la mondo, pri la pozicio de la unuopaj lingvoj, ties parolantaroj kaj regiona disvastigiteco. Krome, kompreneble, interlingvisto bezonas bazajn sciojn pri lingvoscienco. Ĉion ĉi li/ŝi trovas en unika libro, kiu aperis 1979 en Akademie-Verlag Berlin (GDR). La konata lingvisto kaj komunikadosciencisto **prof. d-ro Georg F. Meier,** ĉefredaktoro de la lingvoscienca revuo „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung", kaj lia edzino verkadas 6-voluman bazan verkon pri lingvistiko kaj komunikada scienco, de kiu aperis la unua volumo. (Georg F. Meier/ Barbara Meier „Handbuch der Linguistik und Kommunikationswissenschaft", Band 1: Sprache, Sprachentstehung, Sprachen, Akademie-Verlag 1979). Tiu unua volumo „Lingvo, lingvo-genezo, lingvoj", ampleksas 550 paĝojn kaj havas aldonaĵon de 8 multkoloraj lingvo-mapoj. La verkintoj de tiu eksterordinara libro resumas la problemon pri la esenco de la lingvo (Kio estas lingvo?), pritraktas la diversajn teoriojn kaj vidpunktojn pri la ebla genezo de la homaj lingvoj kaj fine prezentas ĉiujn ĝis nun konatajn lingvojn (pli ol 5600) laŭ decimala klasifiko donante pli malpli detalajn indikojn pri la lingvoj mem, ties regiona disvastiĝo, nombro de parolantoj, plej grava literaturo k. t. p. Detala lingva indekso permesas rapidan orientiĝon. La detalaj lingvo-mapoj peras bonegan optikan superrigardon pri la nuntempa lingva pejzaĝo de la mondo (1. la lingvoj de la tero, 2. la lingvoj de Azio, 3. la lingvoj de la Hinda Subkontinento, 4. la lingvoj de Sudorienta Azio, 5. la lingvoj de Kaŭkazio, 6. la lingvoj de Eŭropo, 7. la lingvoj de Afriko, 8. la lingvoj de Suda Ameriko. En pluaj 5 volumoj profesoro Meier traktos i. a.: II. Skriboj fonetiko k. a., III. Psikolingvistiko, semiotiko, semantiko, leksikologio, stilistiko k. a., IV. Gramatikteorio, vortfarado, tekstteorio k. a., V. Socilingvistiko, tradukologio, faklingvoj, kompara lingvistiko, lingvostatistiko, **interlingvistiko** (!) k. a. VI. Bibliografio.

Per tiu 6-voluma verko prof. Meier kronas sian lingvistikan publican aktivadon, kiu jam nun ampleksas ĉ. 500 kontribuojn. La libro kostas 68 markojn kaj ne plu estas ricevebla en la librovendejoj.

Por interesitaj esperantistoj la aŭtoroj tamen afable kreis eblecon akiri tiun libron, eĉ kun rabato, **por 50 m.** Interesitoj sin direktu rekte al CLE.

En lingvistika revuo

En „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung", Berlin, 2/1980, aperis ampleksa germanlingva raporto pri la internacia seminario „Sciencaj aspektoj de Esperanto", kiu okazis de la 17a ĝis 23a de aprilo 1978 en Ahrenshoop (kp. „der esperantist", 3/1978, p. 8—10) kaj pri la internacia interlingvistika konferenco de 24a ĝis 28a de julio 1978 en Budapest (kp. „der esperantist" 5/1978, p. 14) La raporton verkis D. Blanke.

La gazetaro pri ni 1979

1. Tutrespublikaj organoj

— **„Neues Deutschland“,** Berlin, SED, 7. 4. 79, Esperanto-Asocio en Soveta Unio; 30. 7. 79, 64a Esperanto-Mondkongreso

— **„BZ am Abend“,** Berlin, 23. 1. 79, Insulo Esperanto en Bulgario

— **„Der Morgen“,** Berlin, LDPD, 3./4. 2. 79, Speciala stampo IFER-79; 20. 7. 79, Konversacio kun d-ro D. Blanke; 31. 7. 79, Mondkongreso de esperantistoj; 7. 8. 79, Pri la fermo de la E-kongreso en Luzern; 20. 11. 79, Esperanto-seminario; 1. 12. 79, Speciala stampo pri Esperanto-jubileo

— **„Nationalzeitung“,** Berlin, 11. 5. 79 (110), Lingvokursoj por pruntedoni en „Berliner Stadtbibliothek“; 2. 8. 79, Esperanto-amikoj en Kulturligo

— **„Bauernecho“,** Berlin (organo de Kamparana Partio), 20. 11. 79, Esperanto-seminario en Bad Saarow

— **„Neue Deutsche Bauernzeitung“,** Berlin, 30. 3. 79, Leteroj en Esperanto

— **„Wochenpost“,** Berlin, 7. 12. 79, Ĉu oni ankoraŭ parolas Esperanton?

— **„Junge Welt“,** Berlin (organo de Libera Germana Junularo), 19./20. 11. 79, Esperanto-seminario en Bad Saarow; 24. 11. 79, Lingvobariero forigita per unu planlingvo

— **„Die Trommel“,** Berlin (centra organo de pionirorganizaĵo Ernst Thälmann), 2. 3. 79, Malgranda informo pri Esperanto; 8/79, La kvar mondlingvoj; 40/79, Unu lingvo por ĉiuj

— **„Mitteilungsblatt des Kulturbundes der DDR“,** Berlin, 2/79, Korespondligoj de GDR-esperantistoj, Koresponda kurso en Neubrandenburg

— **„Fahrt frei“** (organo de GDR-fervojistoj), Berlin, 2. 9. 79, Ekspozicio de fervojistaj esperantistoj okaze de festludoj de Ministerio por Trafiko; nov. 79, Jarkunveno de fervojistaj esperantistoj (entute 22 artikoloj)

2. Distriktaj kaj subdistriktaj organoj

2.1. Cottbus

— **„Lausitzer Rundschau“,** Cottbus, SED, 24. 7. 79, Fondkongreso de Asocio de Sovetaj Esperantistoj; 30. 7. 79, Esperanto-Mondkongreso en Luzern (entute 2 artikoloj)

2.2. Dresden

— **„Sächsische Zeitung“,** Dresden, SED, 20./21. 10. 79, Nova E-kurso por komencantoj

— **„Sächsische Zeitung“,** Zittau, SED, 12. 7. 79, Oybin-suveniro en Esperanto; 16. 8. 79, Esperanto en Popola Altlernejo; 27. 11. 79, Esperanto-kurso; 1./2. 12. 79, Amikecvespero en Jablonec

— **„Sächsisches Tageblatt“,** Dresden, NDPD, 22. 6. 79, Suveniro en Esperanto; 24. 8. 79, Esperanto en Popola Altlernejo Zittau; 23. 10. 79, Nova E-kurso por komencantoj

— **„Sächsische Neueste Nachrichten“,** Dresden, 15. 11. 79, E-kurso por infanoj kaj junuloj en Pionirdomo Pirna

— **„Die Union“,** Dresden, 13. 9. 79, Esperanto: pli ol hobio; 5. 5. 79, Demando/respondo pri Esperanto; 8. 9. 79, Esperanto: pli ol hobio (6); 28. 9. 79, Internacia E-renkontiĝo en Meißen (entute 13 artikoloj)

2.3. Erfurt

— **„Thüringer Neueste Nachrichten“,** Erfurt, NDPD, 2. 8. 79, Esperanto-kursoj; 9. 10. 79, Eluzo de la libertempo en amikec-rondoj de Kulturligo

— **„Thüringische Landeszeitung“,** Weimar, SED, 24. 2. 79, Turingia Esperanto-renkontiĝo; 28. 3. 79, Nova Esperanto-kurso; 31. 7. 79, 64a Esperanto-Mondkongreso

— **„Thüringer Tageblatt“,** Weimar, 13. 1. 79, Esperanto — pli ol hobio; 8. 3. 79, Turingiaj Esperanto-amikoj renkontiĝis en Arnstadt; 28. 3. 79, Kurso por Esperanto-amikoj; 6. 7. 79, De Esperanto ĝis filatelo — aktivaj fakgrupoj de Kulturligo en distrikto; 31. 7. 79, Mondkongreso en Lucerno

— **„Das Volk“,** Erfurt, 9. 2. 79, Kial la homoj el Dienstedt ricevas multajn leterojn el eksterlando; 24. 1. 79, Lessing kaj Esperanto; 27. 2. 79, Renkontiĝo de turingiaj esperantistoj; 10. 8. 79, Esperanto kun plej bonaj perspektivoj; 21. 8. 79, 49 landoj ĉe Mondkongreso; 22. 9. 79, Distrikta Renkontiĝo de esperantistoj (entute 16 artikoloj)

2.4. Frankfurt/O.

— **„Neuer Tag“,** Frankfurt/O., 9. 5. 79, Esperanto-kunsido en la distrikta urbo; 20. 7. 79, Interkompreniĝo sub la signo de la verda stelo — Esperanto; 16. 10. 79, Nova Esperanto-kurso

— **„Neuer Tag“,** Bernau, 30. 8. 79, Ŝi sukcesis en Esperanto-ekzameno; Nova kurso

— **„Neuer Tag“,** Bad Saarow, 20. 11. 79, Internacia Esperanto-Seminario komenciĝis

— **„Neuer Tag“,** Seelow, 21 11. 79, Koraj renkontiĝoj kun karaj amikoj en Soveta Unio (entute 6 artikoloj)

2.5. Gera

— **„Volkswacht“,** Gera, 11. 1. 79, Esperantistoj renkontiĝis; 28. 3. 79, Nova kurso; 30. 3. 79. Nova kurso; 16. 6. 79, Esperanto-teatro; 30. 11. 79, Renkontiĝo de esperantistoj en Kulturligo (entute 5 artikoloj)

2.6. Halle

— **„Liberaldemokratische Zeitung“,** Halle, NDPD, 10. 1. 79, De Babel al „Lingwe Universala“; 6. 1. 79, Kion oni aŭdas; 22. 2. 79, Nova kurso; 14. 3. 79, La vojo en la vivon; 25. 7. 79, La ruĝa kaj la verda steloj

— **„Der neue Weg“,** Halle, 23. 2. 79, Nova kurso; 17. 7. 79, Nova kurso ekde septembro; 16. 10. 79, De Esperanto ĝis orkideoj-kultivado; 14. 11. 79. Unu lingvo por ĉiuj?

— **„Freiheit“,** Quedlinburg, SED, 30. 5. 79, Esperanto — pli ol hobio

— **„Neuer Metrik-Regler“,** 3. 4. 79, Ekspozicio en Domo de Kulturligo; 8/79, Ankaŭ en Esperanto aperis libroj (entute 12 artikoloj)

2.7. Karl-Marx-Stadt

— **„Freie Presse“,** Schwarzenberg, SED, 5. 5. 79, Interŝanĝo de salutoj okaze de la 1a Majo; 19. 7. 79, E-renkontiĝo en Hungario: 1 8. 79, Esperantistoj renkontiĝis; 15. 8. 79, Esperanto en la ekspozicio pri libertempo; 8. 10. 79, Internacia E-renkontiĝo en Meißen; 20. 11. 79, Internacia E-seminario komenciĝis; 19. 12. 79, Renkontiĝo okaze de 120a naskiĝtago de d-ro Zamenhof

— **„Freie Presse“,** Karl-Marx-Stadt, SED, 21. 11. 79, Ili salutis sin afable kun „Bonan tagon“

— **„Diamant“,** Organo de partia estraro de VEB Elite-Diamant Karl-Marx-Stadt, februaro 1979, Interkompreniĝo sen tradukistoj

— **„Die Lupe“,** BKH Zwickau, aprilo 1979, Fondiĝo de E-fakrondo de medicinistoj en Kulturligo de GDR (entute 10 artikoloj)

2.8. Leipzig

— **„Leipziger Volkszeitung“,** Leipzig, SED, 3./4. 2. 79, Esperanto diskutata; 17. 6. 79, Esperanto-teatro Warszawa; 22. 6. 79, Interesaj renkontiĝoj kaj migradoj de lingvoamikoj; 30. 6. 79, Esperanto; 25. 8. 79, Kavalirkasko kiel informa suveniro

— **„Mitteldeutsche Neueste Nachrichten“,** Leipzig, NDPD, 12. 3. 79, Pri „IFER-79“: 25. 8. 79, En fremdaj landoj ĉiam komprenebla; 20. 11. 79, E-sminario en Bad Saarow

— **„Der Schmiedewerker“,** Organo de partia organizaĵo VEB Schmiedewerke „Hermann Matern“ Roßwein, novembro 1979, Salutoj el Taŝkent okaze de nia datreveno (entute 9 artikoloj)

2.9. Magdeburg

— **„Volksstimme“,** Magdeburg, SED, 26. 1. 79, Esperanto — lingvo de la estonteco?; 8. 8. 79, Skribita por interesatoj de Esperanto; 25. 8. 79, Informo pri partopreno al ekspozicio

— **„Neueste Nachrichten“,** Magdeburg, 24. 7. 79, Esperanto — la planlingvo de la mondo

(entute 4 artikoloj)

2.10. Neubrandenburg

— **„Freie Erde“,** Neubrandenburg, SED, 31. 1. 79, Zamenhof-vespero; 21. 2. 79, E-grupoj en Domo de Kulturligo; 28. 2. 79, Nova kurso por komencantoj; 7. 3. 79, Dek lecionoj Esperanto; 4. 5. 79, Esperanto-amikoj interkonsiliĝis; 19. 7. 79, Rememoroj de Tadeusz Fikowicz, Koszalin; 31. 8. 79, Nova kurso; 9. 10. 79, Nova kurso; Prelego pri Esperanto; 3. 12. 79, Kunlaboro ankaŭ kun esperantistoj

— **„Freie Erde“,** Templin, SED, 23. 2. 79, Kunlaboro kun polaj amikoj

— **„Freie Erde“,** Neustrelitz, SED, 17. 9. 79, Esperantistoj vizitis amikajn landojn; 26. 11. 79, Semajnfina E-seminario en Neubrandenburg

— **„Freie Erde“,** Ückermünde, SED, 23. 11. 79, Renkontiĝo en Eggesin, Ĉu vi konas Esperanton?

— **„Freie Erde“,** Strasburg, SED, 4. 12. 79, Interesatoj povas ekscii pli pri Esperanto

— **„Demokrat“,** Neubrandenburg, CDU, 31. 7. 79, 64a Mondkongreso; 12. 10. 79, Unu lingvo por ĉiuj?

(entute 16 artikoloj)

2.11. Potsdam

— **„Märkische Union“,** Potsdam, CDU, 10. 3. 79, Esperanto — pli ol hobio; 20. 6. 79, Renkontiĝo de esperantistoj; 6. 9. 79, Esperantistoj rikoltas fruktojn

— **„Brandenburgische Neueste Nachrichten“,** Potsdam, NDPD, 10. 4. 79, Koraj bondeziroj el Potsdam al la esperantistoj en Soveta Unio; 18. 6. 79, Distrikta renkontiĝo de esperantistoj; 1. 9. 79, E-amikoj partoprenas rikolton

— **„Märkische Volksstimme“,** Potsdam, SED, 11. 5. 79, Amika renkontiĝo en Ruse; 16. 6. 79, Esperantistoj atendas gastojn; 18. 6. 79, E-renkontigo en Potsdam; 7. 9. 79, Rikolto kun Esperanto

(entute 10 artikoloj)

2.12. Rostock

— **„Norddeutsche Neueste Nachrichten“,** Rostock, NDPD, 2. 2. 79, . . . kaj vespere Esperanto; 11. 5. 79, „Lumturo“ ĉeestas E-renkontiĝojn; 31. 7. 79, 64a E-Mondkongreso; Renkontiĝo kun esperantisto el Irako, 4. 9. 79, Esperanto ankaŭ en Popola Altlernejo; 5. 9. 79, Raporto pri vojaĝo al Leningrad

— **„Ostseezeitung“,** Rostock, SED, 11. 5. 79, E-renkontiĝo de la tri nordaj distriktoj; 31. 7. 79, 64a E-Mondkongreso; 14. 8. 79, Kun gasto el Bagdad; 4. 9. 79, Raporto pri vojaĝo al Leningrad; 20. 11. 79, 30 referaĵoj en Esperanto

— **„Demokrat“,** Rostock, CDU, 12. 5. 79, Esperantistoj renkontiĝas semajnfine; 4. 9. 79, Kurso en Popola Altlernejo; 9. 6. 79, Popola Altlernejo Rostock

(entute 13 artikoloj)

2.13. Schwerin

— **„Der Demokrat“,** Schwerin, CDU, 13. 1. 79, Esperanto — pli ol hobio; 22. 9. 79, Esperanto — pli ol hobio; 12. 10. 79, Unu lingvo por ĉiuj?

— **„Schweriner Volkszeitung“,** SED, 24. 2. 79, Esperantistoj de CLE kunsidas en Schwerin; 7./8. 7. 79, Interesa ŝatokupo; 28. 8. 79, Pri amikeco en Esperanto; Kurso por komencantoj kaj koresponda kurso por interesuloj

— **„Norddeutsche Zeitung“,** Schwerin, LDPD, 10. 3. 79, Foira Renkontiĝo en Leipzig; 12. 5. 79, Esperantistoj en Rostock; 13. 3. 79, Taskoj por 1979 (Esperantistoj interkonsiliĝis en Rostock); 31. 7. 79, 64a Mondkongreso en Luzern; 4. 9. 79, Kurso en Popola Altlernejo kaj Kulturligo; 10. 10. 79, Kiu deziras paroli Esperanton?

— **„Norddeutsche Neueste Nachrichten“,** Schwerin, NDPD, Nova E-kurso en Greifswald

(entute 13 artikoloj)

2.14. Suhl

— **„Freies Wort“,** Suhl, 20. 11. 79, Esperanto-seminario en Bad Saarow; 7. 12. 79, Esperantistoj invitas

— **„Neue Hochschule“,** Technische Hochschule Ilmenau, 28. 11. 79, n-ro 20/22, Libertempo bone uzata

(entute 3 artikoloj)

Kompilis: Ruth Schonert

3. Komento

Komparante la superrigardon prezentitan kun tiu por 1978 oni povas konstati:

1. Entute CLE eksciis pri 154 artikoloj, aperigitaj en la jaro 1979. Aldonendas 25 Levsen-artikoloj, kiuj aperis en „Der Morgen". Do aperis ĉirkaŭ 180 kontribuoj. Tio estas malpli ol 1978, kiam entute estis registritaj 215 artikoloj.
2. Aliflanke en 1979 aperis tre grava tutpaĝa artikolo en „Wochenpost" kaj aldoniĝis la pionira gazeto „Trommel". Tro malmulte oni uzadas la eblecojn de publikigo en uzinaj gazetoj. 1979 aperis pli da artikoloj en centraj organoj ol 1978 (22 kompare al 14).
3. La gazetara aktiveco en la unuopaj distriktoj estas tre malsama kaj ne nepre estas indikilo pri la vera tiea laboro de la esperantistoj. Fortan regreson oni konstatas kompare al 1978 ĉe jenaj distriktoj: Cottbus (4 — 2), Dresden (22 — 13), Erfurt (20 — 16), Leipzig (12 — 9), Neubrandenburg (25 — 16), Rostock (20 — 13), Magdeburg (7 — 4), Schwerin (25 — 13). Pli malpli konstanta estas la situacio en Gera (6 — 5), Karl-Marx-Stadt (10 — 10), Potsdam (11 — 10). Ioman kreskon notas Frankfurt/Oder (3 — 6), Halle (10 — 12), Suhl (2 — 3).
4. Tro malmulte oni uzadas la eblecojn de publikigo en uzinaj aŭ entreprenaj gazetoj (1978: 1, 1979: 5), kvankam konstateblas ĉi-rilate progreso.
5. 1978 raportis entute 30 diversaj gazetoj. La nombro altiĝis al 47 en 1979.
6. La plej aktivaj distriktoj 1979 estis Neubrandenburg kaj Erfurt (po 16), Dresden, Halle, Rostock, Schwerin (po 13).

Konklude: En ĉiu loka grupo, en ĉiu distrikto oni ekligu fortajn kaj konstantajn rilatojn al la loka kaj distrikta gazetaro, sendu daŭre informojn (ne tro longajn!), kiuj estu kiel eble interesaj kaj ligitaj al iu konkreta evento. Interesa esperantista aranĝo pli valoras, se oni sukcesis aperigi informojn en la gazetaro. Necesas **plani** kaj **respondece realigi** la informan agadon al la gazetaro, ĉar nur tiel kreiĝas atmosfero de informiteco, kiu estas grava por sukcesa varbado de novaj interesatoj por Esperanto.

Internacia renkontiĝo ĉe Berlin 1981

Ankaŭ 1981 okazos Internacia Esperanto-Feriado ĉe Berlin sur la internacia kampadejo „Krossinsee". Ĝi okazos de 14.—26. 9. 1981. La partoprenontoj loĝos en malgrandaj domoj, kiuj troviĝas sur la tereno de la kampadejo „Intercamping", ĉirkaŭataj de arbaro, rekte ĉe la bordo de la lago. En ĉiu dometo estas 4 ĉambroj kun po 3 litoj. En ĉiu ĉambro estas komforto (instalitaj lavopelto kaj elektra akvoboligilo, duŝbanejo en la domo k. t. p.).
Dum la unua demajno (de la 14a ĝis la 19a de septembro) la aranĝo pasos laŭ plano (t. e.: antaŭtagmeze lingvaj lecionoj, prelegoj, seminarioj k. t. p., posttagmeze komunaj migradoj, ekskursoj aŭ banado), sed la duan semajnon la partoprenontoj travivu tute laŭvole. Ekzistas multaj eblecoj viziti la ĉefurbon de GDR, Berlin, la palacan kaj ĝardenan urbo Potsdam kaj aliajn vidindajn lokojn.
La partoprenkotizoj sumiĝas je

200,— markoj por GDR-anoj, 250 markoj por eksterlandanoj.

Per tiuj kotizoj estos rekompensitaj
— 13-foja tranoktado,
— 5-foja tagmanĝado (15a ĝis 19a de septembro) kaj
— kostoj por laŭplanaj aranĝoj (15a ĝis 19a de septembro).
La partoprenontoj mem devas zorgi pri la maten- kaj vespermanĝaĵoj dum la tuta restado en la kampadejo kaj krome ankaŭ por la tagmanĝaĵoj dum la dua semajno (20a ĝis 26a de septembro).
Sur la tereno de „Intercamping" ekzistas rekomendinda restoracio, kie oni bonpreze povas tagmanĝi, kaj krome tie troviĝas vendejo, kie oni povas aĉeti la ĉiutage bezonatajn aĵojn inkluzive nutraĵojn por la maten- kaj vespermanĝo.
La nombro de la disponeblaj litoj estas limigita!
Petu senprokraste (limdato: 30a de majo 1981) aliĝilon kaj precizan programon de

Kulturligo de GDR, Distrikta Laborrondo Esperanto/Berlin
1020 Berlin, Breite Straße 35—36.

Interesataj poŝtrevene ricevos aliĝformularon, kiu estu nepre ĝis la 31a de julio 1981 resendita al la supre nomita adreso. Ĝis la sama limtago oni transpagu la partoprenkotizojn al

Bezirksarbeitskreis Esperanto/Berlin
im Kulturbund der DDR, Poŝta ĉek-konto Berlin 487 40

En esceptaj kazoj eksterlandanoj, post interkonsento kun la organizanto, povas pagi surloke.

Laste aperis 2

Sub tiu rubriko ni informas pri plej gravaj verkoj, kiuj aperas en aŭ pri Esperanto.

— **Don Johano: Kanto unua.** Lord Byron. Trad. W. Auld. Manĉestro. Esperantaj Kajeroj 1979, 71 p.

— **Esperantonimoj.** Marinko Ĝivoje. Pizo Edistudio. 1979 (2a eld. kompletigita), 120 p.

— **La Fenomeno Svislando.** Arthur Baur. Romanshorn: Svisa Esperanto Societo 1979, 44 p.

— **Esperanto: Lerneja eksperimento.** Helmut Sonnabend. Pisa: Editstudio. 1979, 157 p.

— **Histoire de la langue universelle.** Louis Couturat/Léopold Leau. Beigebunden. Les nouvelles langues internationales. Mit einem bibliographischen Nachtrag von Reinhard Haupenthal. Georg Olms Verlag Hildesheim/New York 1979, 576 + 110

— **Einführung in die Interlinguistik.** T. Carlevaro/G. Lobin (Hrsg.), Leuchtturm-Verlag Alsbach 1979, 262 S.

— **L'opera di Bruno Migliorini.** Nel ricordo degli allievi. Massimo Luca Fanfani (Bibliografio de la verkoj de la mondfama itala lingvisto kaj esperantisto), Firenze 1979, 308 p.

— **Sociologio, ĝia historio kaj problemoj.** Peter G. Forster, Liège: Someraj Universitataj Kursoj, Kt 29, 1976, 130 p.

— **Sarkasme kaj entuziasme.** Eseoj pri Esperanta literaturo de Miyamoto masao. Toyonaka-si 1979, 151 p.

— **Bibliografio de la Esperanto-eldonajoj aperigitaj en Pollando 1945 — 1979.** Irena Bednarz. Romo/Varsovio 1979, 29 p.

— **Esperanto laŭ amuzmetodo.** Andrzej Pettyn, Varsovio, PEA, 1979, 224 p.

— **The Future of modern languages in the English-speaking countries.** Humphrey Tonkin kaj Grahame Leon-Smith, Rotterdam, UEA, 1979, 20 p.

— **Historio de Esperanto 1887 — 1912.** Z. Adam (Zakrzewski), Varsovio, PEA, 1979, 144 p. + 8 p.

— **La Inkunabloj de Esperanto.** Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof. Kioto: Eldonejo ludovikita 1979, 283 p. (vol. 1, dua eldono)

— **Kun gradaj paŝoj eksterlanden!** Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, vol. 6. Kioto, 1979, 427 p.

— **Pri Esperanta tradukarto.** Fernando de Diego. Saarbrücken 1979, 71 p.

— **Fervoja leksikono,** André Blondeaux, Franca Esperanta (Franca Fervojista Esperanto-Asocio), 1978, 169 p.

— **La Nealianciteco — Konscienco de la homaro.** Josep Broz Tito, trad. Senad Ĉolić. Sarajevo 1979, 99 p.

— **Leo Tolstoj: La homo, la verkisto kaj la reformisto.** Victor Lebrun. Ascoli Piceno 1978, 425 p.

— **The Cultural value of Esperanto.** D. B. Gregor, UEA, Rotterdam 1979, 12 p.

— **Esperanto: Gramatiko, Esperanta-Latva vortaro, Latva-Esperanta vortaro,** E. Jaunvalks kaj A. Gutmanis, Riga: Liesma, 1979, 577 p.

— **Infanoj en la mondo,** Grethe Horn Mathismoen. El la dana trad. Eliza Kehlet. Kopenhago 1979, 32 p.

— **Kroatserba-Esperanta vortaro** (1966), Marinko Ĝivoje, Zagreb/Pisa, 1979, (2a eld.), 365 + 16 p.

— **Language equality in international relations,** Ralph Harry kaj Mark Mandel, Rotterdam: UEA, 1979, 28 p

— **Literatura antologio** (1905), Red. kaj el la pola trad. Kazimierz Bein, Varsovio: Pola Esperanto-Asocio 1977, 127 p.

— **Programdeklaro de la Hungara Socialisma Laborista Partio,** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1978, 41 p.

— **Kara diablino.** Douglas P. Boatman, Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto 1979, 111 p. Romano

— **Kiel personeco sin strukturas.** Claude Piron. Liège. Someraj Universitataj Kursoj. 1978, 108 + 5 p. Kurso-teksto n-ro 27

— **Podrecznik jezyka miedzynarodowego,** Andrzej Pettyn. Warszawa: Polski Związek Esperantystow 1979, 241 p. Lernolibro

— **Vocabulário Português—Esperanto/Esperanto—Português.** Carlos Domingues, Rio de Janeiro: Ligo Brasileira de Esperanto. 1978, 233 p.

— **Ĉiu ĉiun.** Sep jardekojn en Esperanto-movado. Memorajoj de 86jara optimisto. Teo Jung. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto. 1979, 400 p.

— **Izolo.** K. Kalocsay. Rotterdam: UEA. 1977, 77 p. Poemoj

RECENZOJ

D. Blanke (red.), Soci-politikaj aspektoj de la Esperanto-Movado, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1978, paĝoj 228, 13, 80 nederlandaj guldenoj

Homo, kiu konas la Esperanto-movadon en socialismaj landoj kaj en kapitalismaj landoj, ne povas nei, ke nenie en okcidenta Eŭropo oni trovas la nombran forton de la bulgara movado, la kulturan kaj eldonan viglecon de la hungara movado, la organizitecon de la movado en GDR[1]), la efikon al la publiko de la pola movado aŭ la imponon de la soveta movado.

Certe ĉe ni ĉiu ajn esperantisto rajtas fondi novan mond-savan organizon, eldiri siajn personajn cerbumaĵojn kaj veturi al Esperanto-kongresoj en Brazilujo (se li nur havas monon por tio), kaj el tio oni povus konkludi ke ĉi tie ekzistas pli granda idea viglo. Miaopinie temas nur pri sintrompo, ĉar el nia absoluta, anarhia agadlibereco rezultas nur malmulta efiko al la ĉirkaŭanta socio, kaj cetere homoj, kiuj en la okcidento klopodis enkadrigi Esperanton en la pli vastan socion, renkontis nur nekomprenon kaj akuzojn pri „komunisteco". Ja la ĉefa valoro de la Esperanto-movado por multaj okcidentanoj kuŝas en kontentigo de siaj individuaj bezonoj.

Tio estas ege danĝera por tamen batalanta movado, kiam la gvidantoj mem de la movado je ĉiu nivelo ne povas klare analizi la ĉirkaŭan socion kaj vidi la lokon de Esperanto en ĝi.

Grandan helpon en tiu direkto donas la recenzata verko, en kiu ses elstaraj Esperanto-agantoj (Á. Rátkái, S. N. Podkaminer, D. Blanke, U. Lins, E. K. Drezen, M. I. Isajev) analizas plurajn socipolitikajn aspektojn de la movado por internacia planlingvo. Iliaj studoj kovras vastan kampon: de la personeco de Zamenhof ĝis bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko, de similecoj inter la movado por Volapuko kaj la movado por Esperanto ĝis repritakso de la signifo de la „interna ideo".

Se ekzistus ĉe ni lernejoj por gvidantoj, ĉi tiu verko certe estus unu el la lernolibroj. Ĉu estas tro granda postulo la peto ke ĉiu nuntempa aŭ potenciala grupgvidanto legu ĝin?

Tio neniel signifas ke la ideoj esprimataj de la verkintoj estas rigardindaj kiel dogmaj veroj, kaj laŭ mi jen kaj jen ili estas kritikeblaj ankaŭ el maldekstraj pozicioj, sed certe ili estas rimarkinda kontribuo al kono de la vero pri ni mem (kaj la vero estas ĉiam revolucia, laŭ konata esprimo).

Renato Corsetti

Mór Jókai: „La filoj de l'ŝtonkora homo" Hungara Esperanto-Asocio, Budapest (1978), 60 p.

Mór Jókai (1825—1904) estas granda romanisto de la lastjarcenta Hungario. Li verkis pli ol cent librojn, ties temojn li ĉerpis el la heroaj eventoj de la revolucio kaj liberecbataloj de la jaroj 1848/1849, kaj la tielnomata „reformepoko" inter 1825 kaj 1848.

„La filoj de l'ŝtonkora homo" aperis 1869, du jardekojn post la malvenko de la liberecbatalo. Ĝi estas deviga legaĵo en la antaŭlasta klaso de la hungaraj bazlernejoj, ĝi estas tradukita en ok lingvojn kaj plurfoje filmigita.

HEA prezentas al eksterlanda legantaro la skeleton de la ampleksa verko en formo de bildrakonto. Vilmos Benczik esperantigis la tekstojn de T. Horváth kiuj akompanas la desegnaĵojn de Pál Korcsmáros.

Estas provo apliki la en multaj landoj popularan formon de bildrakontoj kaj liveri facilan, intereskaptan legaĵon ankaŭ por komencantoj.

Rakontiĝas la aventura historio de la tri fratoj Baradlay kiuj diversmaniere kaj diversloke partoprenis la revolucion 1848. Eĉ tiu mallonga bildrakonto kun malmultvorta teksto prezentas mozaikon de aventuro, politiko, heroismo, sed ankaŭ amo, malico, humoro.

Eble la bildrakonto instigas al legado de la nacilingvaj tradukoj de verkoj de Mór Jókai, kiuj helpas al eksterlandanoj pli bone kompreni hungarojn. Tio estis unu el la motivoj kiuj instigis HEA-n eldoni tiun-ĉi libreton.

Linde Knöschke

Politische Parteien, gesellschaftliche Organisationen und Vereinigungen der sozialistischen Länder

So heißt eine Broschüre, herausgegeben vom Lehrbereich Theorie der Kommunistischen Gesellschaftsformation an der Karl-Marx-Universität, Sektion Marx.-leninistische Philosophie / Wissenschaftlicher Kommunismus.
Die 94seitige Arbeit entstand unter Leitung von Dr. Karl-Heinz Gehlauf und führt u. a. auch die Esperanto-Verbände der sozialistischen Staaten auf.

---

[1]) afabla troigo (la red.)

Redaktas: Dieter Berndt

Legu kaj lernu! Lies und lerne! (5)

En tiu ĉi jaro okazis la Esperanto – kongreso en Svedio. Jen kelkaj interesaĵoj pri Svedio kaj svedoj.

Svedio estas la plej granda el la skandinaviaj landoj. La ĉefurbo – Stockholm, kie okazis la kongreso situas en Meza Svedio.

La skandinavia nacia trinkaĵo estas bruna, varma akvo, kiun oni trinkas sub la nomo kafo. Alie oni trinkas bieron kaj brandon. Se svedo trinkis tri glasojn, li invitas al tagmanĝo, se li trinkis ses, li trinkas ci-fratecon kun vi, adoptas vin kiel membron de la familio kaj nomas vin frato.

Inter la skandinaviaj popoloj la svedoj estas sendube la plej bone vestitaj. Ili vestas sin en frako nur por eliri kaj aĉeti vesperan gazeton.

La svedoj estas afabla kaj gastama popolo. Ili skuas la manojn je ĉiu okazo. Kiam ili rekontiĝas, kiam ili salutas, kiam ili deziras bonan tagon aŭ bonan nokton. Post manĝo, post invito. La vorto „tack“ (dankon) estas la plej multe uzata en Svedio. Vi povas ĝin uzi kvincentfoje tage kaj neniu sentos, ke vi troigas.

Nenie oni flagas tiel multe, kiel en Skandinavio. Flagon oni hisas pro ĉiu motivo. Oni flagas, se estas naskiĝtago en la familio, se estas naskiĝtaĝo en la familio de najbaro. Oni flagas se oni atendas gastojn, oni flagas, kiam ili foriras. Ĉar estas festotago, ĉar estas dimanĉo – aŭ simple, ĉar la aliaj flagas. Kaj se oni ne havas alian motivon, oni simple flagas, ĉar oni estas skandinavo.
(El la libro „Ni en Skandinavio“ de W. Breinholst)

Klarigoj

Svedio	– Schweden (man findet auch bei Ländernamen die Formen: Svedujo oder Svedlando)
interesaĵo	– etwas Interessantes
biero	– Bier (Achtung! i und e getrennt sprechen bi-e-ro)
brando	– Brandwein, Schnaps
ci-frateco	– Brüderschaft (ci = du, wird sehr selten gebraucht)
adopti	– annehmen
frako	– Frack
gastama	– gastfreundlich (gasto + ami)
hisi	– hissen
motivo	– Motiv
festotago	– Feiertag (festo + tago)

Ne imageble, kaj tamen

Pluraj esperantistoj el GDR skribis al la kolegoj en la Hungara Kulturcentro en Berlin en Esperanto, mendante librojn. Tipa sekteca sinteno! Eble la hungaraj kolegoj respondos al tiuj superfervoraj esperantistoj el GDR en sia gepatra lingvo, la hungara? Perfekta babelo. Kompreneble la germana ankoraŭ estas uzata en GDR, feliĉe, do oni skribu trankvile germane al la hungaraj kolegoj en Berlin kiuj konas tiun lingvon – se oni atendas trakton de sia mendo.

William Auld, Pri lingvo kaj aliaj artoj, Eld. Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1978, 213 p.

William Auld kunigis sub ĉi tiun titolon 15 eseojn, antaŭe disigitaj en la revuoj **Esperanto** (de U.E.A.), **The British Esperantist, La Nica Literatura Revuo, Monda kulturo** k. a,.

Kial pri lingvo kaj **aliaj artoj,** kvazaŭ la lingvo, ankaŭ ĝi, estus arto? Almenaŭ pro du kialoj. La unua estas, ke la lingvo kiu konsistigas la objekton de la eseoj estas aparta lingvo, en kies ellaborado la konscia faktoro grave rolis; ĉu estas necese, ke mi nomu ĝin? La dua estas, ke — almenaŭ por la aŭtoro — la estetika funkcio de la lingvaĵo (aŭ ĝia poezia funkcio, se mi adoptus la jakobsonan esprimon) troviĝas inter la plej gravaj funkcioj, ja Auld estas unu el la malmultaj plenmajstrece pruvintaj la poezian funkcieblecon de la „zamenhofa" lingvo. Kaj, kiel ajn oni rigardus la aferon, la manipulado de lingvo en la beletro estas unu inter la tradiciaj artoj — la vortarto.

Vigle, sed ne senargumente, la aŭtoro refutas iujn antaŭjuĝojn pri la internacia helpa lingvo („Mitoj kaj faktoj pri Esperanto", p. 5—20), turnante kelkfoje la kontraŭargumentojn favore al la kritikita objekto: „Juna estas nia literaturo, sed ĝi havas la virtojn de la junaĝo" („Pensoj pri la ‚juneco' de la Esperanta literaturo", p. 179). Malgraŭe, signoj pri evoluo ekzistas, kaj la maturiĝo, almenaŭ de la esperantlingva poezio, estas bildigita per citaĵoj el la verkoj de Miĥalski kaj Kalocsay, kiuj kreis en la lingvo, tiom pridiskutata de teoriistoj, ritmojn kaj esprimvariaĵojn nesupozitaj de tiuj neinteresiĝantaj pri la fenomeno Esperanto („La evoluo de la Esperanta poezio", p. 159—174). Aparte interesa eseo estas tiu sub la titolo „la Internacia lingvo kiel belarta tradukilo" (p. 95—157). Oni montras tie, ke „pere de la literaturo de iu popolo, tiuj, kiuj kapablas ĝin legi, povas konstati ne nur la supraĵojn apartaĵojn /.../ de tiu popolo, sed ankaŭ, pli vere, ĝian fundamentan homecon kaj similecon al aliaj popoloj" (p. 95) kaj ke „NE ĉio kulture valora estas verkita en la plej vaste parolataj lingvoj" (p. 99). Jen du ideoj favorantaj la utiligon de Esperanto kiel pontolingvo en la beletraj tradukoj. Estas citataj la plej sukcesaj esperantigoj el la naciaj lingvoj kaj kelke da modelaj esperantlingvaj antologioj, jam ĝenerale konataj al la esperantistaro. Preskaŭ konsentante la aŭtoron pri la fakto ke „la decida faktoro en tradukado la sola kondiĉo por ĝia ‚ebleco' aŭ ‚neebleco', estas la talento de la tradukanto" (p. 106), mi ne povas konsenti ankaŭ la aserton „lingvo, por si mem, nenion signifas" (p. 107), eĉ se oni argumentas per la arbitro de la lingva signo (la aŭtoro skribas „la konvencio de la vortoj" kaj citas apoge la historiiston V. Gordon Childe), pro tio ke tiamaniere oni malatentas faktoron, nomata de Eugenio Coseriu „idioma kunteksto", kiu malpermesas neglekti certajn striktajn apartaĵojn, specifaj al iu aŭ alia lingvosistemo, apartaĵoj fariĝantaj kelkfoje aŭtentikaj baroj kontraŭ integra traduko. Oni permesu al mi la nuran ekzemplon de la heine-a strofduo „Ein Fichtenbaum steht einsam", kiu — en la germana — krom bonega pejzaĝa poeziaĵo estas ankaŭ subtile erotika lirikpeco, dum en la rumana — ekzemple — ĝi perdas la duan econ, ĉar al la germanaj substantivoj **Fichtenbaum** (virgenra) kaj **Palme** (viringenra) respondas la rumanaj **brad** kaj **palmier** (ambaŭ virgenraj). Ni notu, ke ankaŭ la esperantlingva sistemo restas senpova kontraŭ tia baro: la arbonomoj ja estas neŭtragenraj, substitueblaj per **ĝi,** en Esperanto (Oni bonvolu vidi la esperantlingvan version de tiu heine-a poeziaĵo en „Fundamenta Krestomatio"). Sekve, aserti ke „lingvo ... posdas nur tiom da signifo, kiom al ĝi donas la homaj mensoj" (p. 107), per kio oni devas kompreni la mensojn de la parolantoj de iu lingvo iumomente, estas riska ideo. Iu lingvo koncentrigas en sin ankaŭ la sperton kaj la manieron kompreni la mondon (inkluzive) la lingvon de la antaŭaj generacioj — tio estas historia faktoro — kaj ankaŭ la manieron laŭ kiu objektive, sendependе de la individuaj parolantoj, la lingvaj konkretaj elementoj interrilatiĝas — do tio estas aparta lingva sistemo, modifiĝanta preskaŭ nerimarkeble

kaj nur dum longa tempodaŭro. Tiu interrilatiĝo ja ne estas identa en ĉiuj lingvoj, ankaŭ en tiuj parencaj. Oni permesu al mi liveri tute etan ekzemplon, el la fakta amaso. De la rumana **obraz** „vango" estas devenantaj la vortoj **obraznic** „aŭdaca" kaj **obrazar** „masko", dum de la itala **guancia,** same „vango", oni devenigas **guanciale** „kuseno" k.t.p. Estas certa reala rilato tiel inter la vango kaj la masko, same kiel inter la vango kaj la kuseno, sed la unua estis okulfrapa por la rumanoj kaj la dua ne, dum por la italoj okazis inverse, kaj tiaj faktoj estas aparte „sankciitaj" en diversaj lingvosistemoj. Konklude, la vortfamilioj de la ekvivalentoj rum. **obraz** = it. **guancia** ne koincidas, kaj estas vaste konataj en la lingvoscienco tiaspecaj distingoj faritaj de Louis Hjelmslev en sia „Prolegomena to a Theory of Language". La eseo, pri kiu nun temas, finiĝas per tri tradukaj specimenoj: **L'albatros** de Baudelaire, **The Tiger** de William Blake kaj **Ancar** de Puŝkin (originaloj kaj po du versioj en aliaj lingvoj, inter kiuj — Esperanto); ĉiuj tradukaĵoj estas detale komentitaj, neniel trotaksante la esperantlingvajn, kaj la objektiveco regas la komentojn, kvankam unu esperantlingva versio apartenas al la komentinto mem.

Ŝajnas al mi, ke en la cetere tre interesa eseo „Ĉu prefere nacilingvo?" (p. 201—202); la demando estas farita rilate la internacian komunikadon), tamen la rolo de la naciaj lingvoj en internaciskala komunikado estas tre subtaksita, kiam oni trovas ilin taŭgaj nur por ... demandi pri la vojo aŭ peti manĝon dum eksterlanda vojaĝo. Oni ne forgesu, ke kion oni realigis ĝis nun historie en la internacia kunlaboro kaj sur la kampo de la alproksimiĝo de popoloj, tio estas farita pere de la naciaj lingvoj internaciskale konataj. Aliflanke, serioza vojo al la konado de iu popolo, de ĝiaj propraj kulturaj valoraĵoj, ne povas resti ekster la multflanka kaj profunda kono de ties lingvo. Ĉar — tute konsentante pri la ĝenerala homogeneco de la homaro en ĝiaj rilatoj kun la naturo kaj la socio, kun la tekniko kaj la progreso de la konado, kun la bezono de paco kaj la aspiro je spiritpleniĝo — tamen, en nia nuna, reala mondo, eszistas multe da diferencoj inter la diversaj nacioj, kaj unu el la ĉefaj estas lingva. Ĉi tiu diferenco estas tiel enradikiĝinta en la konscio de la amasoj (kaj ni pensu, ke la tergloba loĝantaro estas ĉirkaŭ je kvar miliardoj),ke ĝi ŝajnas al la plimulto de la homaro natura kaj neforigebla. Kaj, denove oni ne forgesu, ke lingvo estas precipe socia fenomeno, sed naturajn trajtojn ĝi ankoraŭ havas kaj havos tiom da tempo, kiom la homoj parolos per la buŝo! Sam kiel la familio, la lingvo estas parte natura, kaj parte socia fenomeno; do ĝi ne apartenas al la superstrukturo (en marksismaj terminoj), kaj tial neniam estos eble solvi lingvajn problemojn pere de la perforto, de iu eksplodo, de la revolucio. Estas ja bone konata la fakto, ke socia revolucio tuŝas la lingvon, sed ne ŝanĝas ĝin radikale.

Malgraŭ tio, ne estas malpli vere, ke neŭtrala internacia komunikilo, precipe kiam la komunikado estas internacie multflanka, t. e. implicas partnerojn de tre variaj nacioj, kaj, sekve, de tre variaj lingvoj, alportus grandan servon. La kampoj en kiuj la funkciado de tia ilo estus plene pravigata estas tiuj de la komerco, de la diplomatio kaj de la scienco. Mi nenion diris pri la turisma kampo — kvankam ankaŭ ĝi profitus je tia ilo pro tio ke, ĝenerale, komercisto, diplomato kaj scienculo oni estas dum tuta vivo, preskaŭ ĉiumomente, dum ekskursanto oni estas nur okaze. Ankaŭ koncerne beletristikon, tia ilo distingigas diversajn gradojn: por esti vera internacia komunikilo, ĝi devas servi unue kiel pontolingvo, kio metas sur la ĉefan planon la tradukon kaj situigas malantaŭ tio la originalan verkadon. Ĉi lasta preskaŭ fariĝas ludo, se oni konsideras ĝin laŭ la ĉefa celo, kiun oni povas trovi por internacia komunikilo. Ja por neniu estas sekreto, ke estas multe pli facile originale verki — se oni havas talenton, certe — ol bone traduki, en kiujn lingvo(n). Tamen, la originala verkado estas necesa, kiam temas pri Esperanto, ĉar nur pere de ĝi oni fleksigas la lingvon kaj oni aldonas al la ĉi — lasta novajn eblecojn por postaj tradukoj.

La libro ĉi tie prezentata certe instigas al la diskutado, alportante interesajn vidpunktojn en la problemon de la internacia komunikado kaj ĝia raciigo, sed kelkloke enhavas ankaŭ — parte aŭ entute — neaprobindajn ideojn, kelke da kiuj mi reliefigis ĉi-supre.

Mi signalas, ĉefine, iujn preserarojn, inter la ĉirkaŭ dek, kiuj povus malhelpi fluan legadon de la libro: **ne** anstataŭ **ni** (p. 75), **el** anstataŭ **ol** (p. 159), **vivpunkto** anstataŭ **vidpunkto** (p. 190).

Constantin Dominte
(Bukureŝto)

1979 en diversaj lokoj de USSR la esperantistoj okazigis vesperojn pri GDR, okaze de ĝia 30a jubileo. Jen foto pri partoprenintoj de tia aranĝo el Samarkando.

La 8a Kongreso de la Esperantistoj de Slovakio

De la 27a ĝis la 29a de junio 1980 okazis en la orientslovaka urbo Prešov la 8a Kongreso de AESSR (Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko). Partoprenis ĉirkaŭ 260 personoj — delegitoj el ĉiuj regionoj de Slovakio, reprezentanto de la ministerio pri kulturo de SSR kaj gastoj el fratai landoj — el Bulgario (BEA), Ĉehio (ĈEA), Hungario (HEA), GDR (CLE en KL), Pollando (PEA).

La kongreso okazis en moderna konstruaĵo sub plej bonaj kondiĉoj. Antaŭ la kongresa salono estis granda Esperanto-ekspozicio pri diversàj trajtoj de nia movado — kvazaŭ enciklopedia superrigardo pri la nuntempa Esperanto.

La kongreson salutis la reprezentantino de ministerio pri kulturo, sinjorino Jankovska kaj la gastoj el la frataj landoj. La prezidanto de AESSR, s-ro Milan Zvara, raportis pri la rezultoj de la Esperanto-aktivecoj de la pasintaj jaroj – i. a. pri

— stabiligo de la estraroj en la regionoj
— internacia kunlaboro
— evoluigo de multflanka internacia turismo
— sciencteknika faka laboro
— membrostatistiko (la membraro tre sukcese evoluis)
— eldona agado
— altigo de la lingva nivelo kaj eduko de funkciuloj.

Poste la kongresanoj laboris en komisionoj: pedagogia, junulara, sciencteknika, naturdefenda, fervojista, Mondpaca Esperantista Movado.

La delegitoj elektis novan centran komitaton de AESSR, kies prezidanto denove fariĝis s-ro Milan Zvara. Por honorigi longjarajn aktivajn agantojn de Esperanto AESSR transdonis la novfonditan medalon inter slovakoj kaj aktivuloj de eksterlando. Inter la honorigitoj ankaŭ estis la skretario de Centra Laborrondo Esperanto en KL de GDR.

Ekster la oficiala programo okazis diversaj prelegoj kaj ankaŭ granda kultura vespero per junulaj grupoj el Pollando.

Multan dankon al niaj slovakaj amikoj.

Flanke de CLE partoprenis: D-ro Giso Brosche, prezidanto de medicina fakrondo, Werner Pfennig, prezidanto de DLE en Neubrandenburg, membro de la prezidio de CLE. W. Pfennig

Ni kore gratulas

— al d-ro H.-Joachim Hußner el Ilmenau, prezidanto de DLE Suhl, pro la distingo per la Johannes-R.-Becher-modalo en arĝento
— al Herbert Scheffs el Potsdam, iama laborista esperantisto kaj aktiva aganto en la distrikto kaj subdistrikto Potsdam, kiu festis 1980 sian 65-an naskiĝtagon
— al Heinz Rupp, unua sekretario de la Distrikta Estraro de Kulturligo en Potsdam, amiko de Esperanto, kiu en junio 1980 doktoriĝis
— al Jörg kaj Maria Birkefeld (naskita Scheide) okaze de ilia geedziĝo, la 17an de majo 1980
— al Erika Dudás kaj Hans-Peter Bartos, kiuj geedziĝis la 2an de majo 1980 en Jobbágyi, Hungario
— al d-ro Boris Nedkov el Sofio, direktoro de la Bulgara Esperanto-Muzeo, kiu festis la 28an de majo 1980 sian 80an naskiĝtagon

Ni funebras

— pro la forpaso de la konata iama laborista esperantisto Karl Förtsch (6. 12. 1904 — 7. 7. 1980) el Ruhla
— pro la forpaso de Georg David, la 26an de majo 1980 en Frankfurt/O.
— pro la farpaso de Edwin Wugk el Dresden, malnova laborista esperantisto, la 7an de majo 1980

KORESPONDDEZIROJ 31635

Bulgario

Membroj de E-societo „Progreso“, **5180 Polski Trambeŝ,** dez. kor. tutmonde:

— Inĝ. Bogomil Ĉésmeĝiev, str. Lale 11, 26j., fraŭlo, pri sporto, tekniko, kino
— Teodora Anastasova, str. Klokotnica 3, 30j., instruistino, pri lingvoj, instruado, modo
— Rozalina Galunova, str. Ruen 35, 14j., lernantino, pri naturo, lernejo, kino
— Rajna Georgieva, str. Ruen 13, 46j., uzina kontistino, pri virinaj aferoj, modo, paco
— Ilijan Markov, str. Rakovska 19, 25j., komsomola aktivulo, pri junulaj problemoj, sporto, k. a.
— Elka Tabakova, str. 1 Maj 4, 26j., uzina oficistino, pri modo, naturo
— Marija Mihajlova, str. Ivan Genkov 1, 25j., uzina oficistino, pri modo, naturo
— Marija Caĉeva, str. Georgi Petkob 3, 43j., poŝta oficistino, pri modo, virinaj problemoj
— Krastina Dimitrova, str. Ropotamo 10, 35j., instruistino, pri edukado, modo
— Margarita Jordanova str. 1 Maj 20, 26j., instruistino, pri filmoj, muziko

Mariana G.Gateva, **4199 s. Trud,** okr. Plovdivski, 20j., dez. kor. pri fiziko, matematiko, literaturo, belarto, muziko

Kalina Konstantinova, **4004 Plovdiv,** ul. Asen Halaĉev 71, 17j., dez. kor. pri muziko, belarto, literaturo, lingvoj

Esperanto-societo „Vekiĝo“, p. k. 60, **9700 Ŝumen,** aŭtune celebros la 75an datrevenon de sia fondiĝo. Ni invitas ĉiujn geamikojn sendi salutleterojn, bondezirojn kaj korespondproponojn

ĈSSR

23j. studento-inĝeniero dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., interŝ. lumbildojn: Radim Surý, Alŝovo pl. 691, **70800 Ostrava-Poruba**

Lernantino, 13j., dez. kor.: Nana Klosová, Smolikova, 3, **150 00 Praha 5**

Francio

Marc Blondel, 22 Rue Claude Debussy, **59130 Lambersart,** dez. kor. tutmonde, kol. pm

GDR

Hans R. Schmidt, **2800 Ludwigslust,** Schweriner Allee 35, 35j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, E-insignojn, E-literaturon

Brigitte Schwartze, **4020 Halle,** Seebener Straße 31, (36j.), dez. kor. tutmonde

Socialprizorgistino, 42j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Brigitte Raabe, **1546 Staaken,** Sulzbacher Steig 1

Steffen Raabe, **1546 Staaken,** Sulzbacher Steig 1, 13j., dez. kor. tutmonde, kol. bk, pm

Hungario

Laboristo, 25j., dez. kor. kun juna esperantistino: László Kemény, **1072 Budapest,** VII Rákocsi hpt. 8/a, II/21

Vendejestrino, 28j., dez. kor.: Magdalena Széplaki, **5720 Sarkad,** Pf. 2h

Asistantino, 24j., dez. kor.: Tereza Balogh, **5720 Sarkad,** Skeresztun u. 46

Klara Vathi, **8154 Polgárdi,** Killián ut. 8, (16j.), dez. kor.

Ildikó Szombati-Szabó, **2120 Dunakeszi,** Marx Tér 2, (19j., dez. kor. pri vojaĝoj, fotografado, kol. bk

Mongolio

Instruistino, 26j., dez. kor. pri muziko, sporto: G. Purevdelger, **Ulanbator,** Poŝto nr. 51, **p. k. 134**

Pollando

Membroj de Pola Studenta Esperantista Klubo, SZSP Zarzad Wejenódski, ul. 3 Maja 7, **40-096 Katowice,** (19—25j.), dez. kor. pri literaturo, moderna muziko, turismo, interŝanĝas turismajn prospektojn, bk

Ryszard Rauczynski, **31-054 Kraków,** str. Dietla 49, dez. kor. k. Berlinaj esperantistoj

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 893